n-ro 52

aprilo 1996

## Por la membroj: La aboco de tempoplanado

Vi certe miris antaŭ kelkaj semajnoj pri la nemendita alsendo de la broŝuro "La aboco de tempoplanado" fare de UEA. Temas ne pri eraro, sed pri celita agado de nia prezidanto F. J. Braun. Li interkonsentis kun mi kiel financa konsilanto, ke IKEF disponigu al ĉiuj membroj tiun broŝuron, senkoste por ili. La kostojn por tio portas duone nia kaso, duone estas donaco de nia prezidanto.

Li opinias, ke "La aboco de tempoplanado" de Lothar J. Seiwert estas efika kaj necesa helpilo por raciigi sian tempo-uzadon. Obeante al la proponoj de la aŭtoro, la leganto (do ĉiu IKEF-membro) gajnas liberan tempon, kiun li/ŝi - laŭ ideo de nia prezidanto - uzu por agadoj en la senco de IKEF, do por akceptigo kaj enkonduko de Esperanto en komerco kaj ekonomio.

Roland ROTSAERT

## Enhavo

Administrado - Raporto pri 1995 . . . . . . . . . . . 3
Spezokonto-bilanco . . . . . . . . . . . . . . . . . . 6
Financa raporto . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 8
Anoncitaj aranĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . 9
Zamenhof-monumento en Ĉinio . . . . . . . . . . . . . 10
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . . . . 11
Novaj membroj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 12

**La Merkato** (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** estas dujara eldono por la membroj de IKEF. Ĝi ne estas aparte vendata.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König.

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**:
Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)knooppunt.be.

Atentu !

Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

**La jara membreca kotizo** estas 600 belgaj frankoj (BEF) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") (aŭ egalvaloro: 30 NLG, 30 DEM, 20 USD) kaj 400 BEF por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj") (20 NLG, 20 DEM aŭ 14 USD).

Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj**: - Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per **eŭroĉeko** (en belgaj frankoj, kun kartonumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT, kaj per internaciaj respondkuponoj (1 IRK = 34 belgaj frankoj).

**Perantoj**:

*Cinio*: S-ro **WANG Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an

*Francio*: S-ro François-Xavier **GILBERT**, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon
(CCP 1275-89 L Nancy)

*Germanio*: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

*Hungario*: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio*: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro



*Japanio*: S-ro **YAMASAKI** Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12; retpoŝto study069(a)jpndokyo.dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

**Administrado - Grava atentigo al niaj membroj**

1. La estraro prezentas sur la sekvaj paĝoj sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 1995 kaj proponas aprobon de tiu raporto.

2. La estraro prezentas sur paĝo 8 la financan raporton de IKEF por la jaro 1995, notante ke la ciferoj estas prezentitaj en bona tempo al la revizoro. D-ro Polerani juĝis ilin bonaj kaj en ordo. Tial la estraro proponas aprobon de tiu financa raporto.

3. La estraro notas la sumon de financa deficito de 14.005 BEF kaj proponas deprenon de tiu deficito de la kapitalo.

4. La estraranoj s-ro Braun (Prezidanto) kaj d-ro Picasso, ambaŭ elektitaj en 1994, baldaŭ estos du jarojn en sia ofico. Laŭ la statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Do ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. Ambaŭ pretas kandidatiĝi. En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas ilian reelekton.

5. Nia statuto, alineoj 7.4 kaj 8, montras la procedon pri aprobo de la financa raporto kaj de la raporto pri agado. Ĉi-jare ni denove organizos Ĝeneralan Kunvenon por niaj membroj kadre de la Universala Kongreso en Prago, Ĉeĥio. Diskutado kaj aprobo de la raportoj (vidu punktojn 1-3 supre) kaj elekto de estraranoj (vidu punkton 4 supre) okazos tie. Membroj kiuj ne povas veni al Prago, rajtas skribe komisii alian membron ĉeestontan pri aprobo kaj voĉdonado; tiun agon la estraro rekomendas. La precizan daton, horon kaj salonon de nia Ĝenerala Kunveno ni avizos en la venonta La Merkato.

La Estraro de IKEF

**Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1995**

**Membraro denove kresketis**

La membraro kreskis de 115 fine de 1994 al 121 fine de 1995. Ĝojige estas, ke la kunfondinto de IKEF, s-ro Lawrence Mee, multjara Ĝenerala Sekretario dekomence kaj dumviva membro, eksiĝinta antaŭ kelkaj jaroj, remembriĝis.



**IKEF fariĝis 10jara**

Nia fakgrupo estis fondita je la 6a de aŭgusto 1985 dum la 70a Universala Kongreso en Augsburg, Germanio; Do, la agado dum la jaro 1995 okazis sub la rigardo al 10jara ekzistad-jubileeto.

Kiel ĉefa faka agadloko prezentiĝis la 80a UK en Tampere, Finnlando. Pri tio ne jam multe raportis, speciale en La Merkato n-ro 50. Tial ni ĉi tie volas nur koncize listigi la opajn okazaĵojn:

-Unuafoje nia membro d-ro Gianfranco Polerani (IKEF 12) partoprenis la kunsidojn de la Komitato kaj kundecidis pri la aferoj de UEA.
-Nian Ĝeneralan Kunvenon partoprenis 41 personoj, el ili 18 membroj kaj 23 interesitoj. La sepkapa estraro estis reprezentata per kvin estraranoj.
-Kvin novaj membroj aliĝis dum la Ĝenerala Kunveno.
-Esperanto-Centro Paderborn, Germanio, kune kun IKEF aranĝis dum la kongreso kvartagan seminarion pri optimumaj strategioj. S-ro Hermann Behrmann, prezidanto de la Esperanto-Centro, instruis EKS (Energi-Kibernetika Strategio) de la germana sistemesploristo Wolfgang Mewes.
-Ni aranĝis viziton al la Komerca Ĉambro en Tampereo. Entute 30 personoj ricevis tie valorajn informojn pri la ekonomia situacio de Tampereo kaj de Finnlando.
-La estraro de IKEF faris du apartajn kunsidojn kaj pritraktis diversajn temojn. I.a. oni definitive ellaboris regularon pri perantoj de IKEF.

Fine de la jubilea jaro la redaktoro de la UEA-revuo "ESPERANTO" petis nin, ke ni prezentu IKEF en tiu revuo. Tio okazis en la decembro numero (1076/12), per tutpaĝa artikolo "Kiuj plej praktike uzas Esperanton", el la plumo de nia prezidanto.

**La Merkato regule aperis**

Dum 1995 nia komunikilo La Merkato regule kaj tre akurate aperis kvarfoje. La jubilean n-ron 50 de oktobro ornamis unuafoje nia nova emblemo, desegnita de Flandra E-Ligo.

**Terminara Sekcio paŭzis**

Pro demisio de la kunordiganto s-ro Hans Wiersch, la Terminara Sekcio dum la tuta jaro ne laboris. Fine s-ro Yamasaki (IKEF 43) deklaris sin preta transpreni la postenon de kunordiganto. Espereble en la nova jaro 1996 la Terminara Sekcio sub lia gvidado denove povos pluki fruktojn de aktiva agado.
Kunlaborantoj diverslandaj estas serĉataj. Ili anoncu sin al s-ro Yamasaki aŭ al la Prezidanto.

**Verka agado sur rimarkinda nivelo**

Dum la jaro 1995 la verka agado de niaj membroj estis sur simile alta nivelo kiel en la antaŭa jaro. Tio ankaŭ signifas ke ĝi ankoraŭ estas kreskigebla.

La "Ekonomia Bulteno pri Usono" de nia membro d-ro Goldman, Usono (IKEF 52) ankaŭ ĉi-jare aperis, kvankam pro malsano de la aŭtoro fine de la jaro kelkaj numeroj elfalis.

En MONATO, esperantlingva internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo, du IKEF-membroj estas responsa redaktoro pri iu fako: Roland Rotsaert (IKEF 3) por ekonomio, Yamasaki Seikô (IKEF 43) por lingvo; ne mirige, ke s-roj Rotsaert kaj Yamasaki, krom aliaj, estas la ĉefaj aŭtoroj de IKEF pri ekonomio kaj aliaj temoj. Do la rubriko "Ekonomio" en ĉiuj 12 numeroj de la jaro 1995 estis kontentige plenumita. Ĉe tiu okazo ni denove atentigas niajn membrojn pri la fakto, ke MONATO estas la ĉefa podio por nia verka agado, kaj ni rekomendas al ili la abonon de MONATO.

**BEK - Bulteno de Esperanta Komerco**

Nova periodaĵo sub la IKEFa ĉielo. Temas pri BEK - Bulteno de Esperantista Komerco, kiun regule eldonas nia ĉina peranto s-ro WANG Tianyi (IKEF 117). Ĝi estas dulingva - ĉina kaj Esperanto - kaj diskonigas anoncetojn pri deziroj al vendo/ aĉeto de varoj aŭ diversaj servoj. Ĝis decembro 1995 aperis jam 14 numeroj kvarpaĝaj.

**Resumo**

La jaro 1995 por IKEF staris sub la stelo de ĝia 10jara ekzistado. Konsidere al la diversaj aktivaĵoj ĝi estis sukcesa jaro. Ni povas konstati, ke la mencio de nia fakgrupo en la Esperantista gazetaro pliofteĝas kaj per tio la renomo de IKEF en la E-mondo pli kaj pli kreskas. Al tio certe ankaŭ helpas, ke la nove elektita prezidanto de UEA, profesoro LEE Chong-Yeon (IKEF 73) kaj la ĵus elektita prezidanto de la Akademio de Esperanto, d-ro Werner Bormann (IKEF 27) estas - kaj espereble restas - membroj de IKEF.

Do ni vidas, ke celdirekta strategio kaj diligenta laboro ĉiam efikas kaj valoras la penon. Tamen ni restu sur firma grundo de konstateblaj faktoj; kaj tiuj montras al ni, ke ankaŭ en 1995 ni pritraktis nur etan peceton de la tuta ebla taskaro troviĝanta sur la kampoj komerco, ekonomio kaj ekonomiko. Do neniu kaj nenio povos malhelpi plimultigon de nia sukceso, se ni intensigos nian aktivecon. Al tio ni invitas vin.

Franz J. Braun

**Financa raporto pri la jaro 1995**

La bilanco kaj la spezokonto estas presitaj sur la mezaj paĝoj de ĉi tiu revuo. Je 31 decembro 1995 la spezokonto montris deficiton de 14.005 belgaj frankoj.

Ĉe la enspeza flanko ja estas pli grandaj enspezoj pro membrokotizoj, sed mankis granda donaco. La elspezoj estas konsiderinde pli grandaj. Unuflanke estas la kutimaj elspezoj, kiel afranko, kiuj kreskadas pro inflacio kaj pro pli granda aktiveco de IKEF. Aliflanke estas unufojaj elspezoj kiuj rilatas al la nova emblemo: desegno, presado de leterpapero, presado de kovrilpaĝo por la revuo... Principe eblus deskribi tiujn kostojn dum pluraj jaroj kaj tiel iom plibeligi la financan situacion. Tamen ŝajnas pli saĝe ne fari tion, ĉar ekzemple leterpapero povas rapide perdi sian valoron pro iu ŝanĝo de nomo aŭ adreso.

La deficito estis antaŭvidita dum 1995 kaj jam estas kelkaj decidoj por estonte eviti ĝin: la jara kotizo ekde 1996 altiĝas por parto de la membraro; La Merkato nun uzas malpli grandan litertipon, kio ŝparas paperon kaj kompensos la altigon de la sendkostoj.

Mi proponas subtrahi la deficiton pri la jaro 1995 de la kapitalo. Tiel la nova saldo de la kapitalo iĝos 32.674 belgaj frankoj.

Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto

**IKEF-membro iĝis prezidanto de la Akademio**

La prezidanto de IKEF, F.J. Braun, sendis gratulleteron al d-ro Werner BORMANN (IKEF 27), kiu estas la nova prezidanto de la Akademio de Esperanto. Nun kaj la prezidanto de UEA, kaj la prezidanto de la Akademio, estas IKEF-anoj.

**Revuo Eventoj: 100 numeroj !**

En marto 1992 aperis la unua numero de nova, dusemajna E-revuo EVENTOJ. Kvankam siatempe oni opiniis ke la projekto estas preskaŭ nerealigebla, ĵus aperis la 100a numero. Eventoj nun havas legantojn en pli ol 50 landoj. Tio ne estas la nura realigo: Eventoj ankaŭ ellaboris E-literaron por IBM- kaj Makintoŝ-komputiloj, kompilis diversajn utilajn listojn, prizorgas publike atingeblan liston de E-aranĝoj, ktp.

RR

**Anoncitaj aranĝoj**

Budapeŝto (Hungario), 30-31 majo 1995: "Coopme-Interprise"-Konferenco en kadro de la eŭropa PHARE-Coopme-programo. Stimulo de kunlaborkontraktoj inter mal- kaj mezgrandaj entreprenoj de EU kaj meza kaj orienta Eŭropo. Informoj: Euro Info, Dorothya u. 4, H-1051 Budapest; fakso (36-1)118.61.98 (La informilo de la Eŭropa Komisiono, marto 1996).

Poprad (Slovakio), 7-9 junio 1996: "Venu kaj aĉetu", seminario de komercistoj. Inf.: Esperanto - Regiona Societo, Sobotské nám 36, SK-058 01 POPRAD; tel. +42-92-32-419.

Colmar (Francio), 8-9 junio 1996: 1a sciencteknika seminario. Temo: Via Domo - ene - ĉirkaŭe - sure. Informoj: TAKE, RN 83, Rue de Tiefenbach, F-68920 WINTZENHEIM, fakso (+33) 89.77.52.56, rete 100-623.3022(a)compuserve.com.

Rastatt (Germanio), 21-23 junio 1996: Kurso pri terminfarado. Informoj: s-ro Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, D-78050 VILLINGEN, fakso +49-7721-22-074.

Ŝanhajo (Ĉinio), Universitato pri Internaciaj Studoj, 22-25 aŭgusto 1996: 1a Azia Kongreso. Subtemo i.a.: Azia ekonomio kaj la 21a jarcento. Informoj: Shanghai-a E-Asocio, 7-622 Hua Hai Zhong Lu, CN-200020 SHANGHAI, Ĉinio, fakso +86-21-63272894. Planas partopreni i.a. IKEF-membroj Yamasaki Seikô, Wang Tianyi kaj Lee Teck Shiu.

Ferrara (Italio), 24-28 aŭgusto 1996: 65a Itala Kongreso de Esperanto. Temo: Internacia Komunikado en la mezaj kaj malgrandaj entreprenoj (pritraktota en loka komerca ĉambro). LKK: Edvige Ackermann, via Valerio 110, I-34128 TRIESTE, telefono kaj fakso 00-39-40-350093. Planas partopreni i.a. IKEF-membroj Braun, Picasso kaj Polerani.

Beijing (Ĉinio), 2-7 septembro 1996: Internacia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko. Temo: La 21a jarcento - nova periodo de scienca kaj teknika evoluo. Laborlingvoj: Esperanto, angla, ĉina. Kotizo: 350 USD; loĝado 30 ĝis 100 USD. Limdato: fino de aprilo. Informoj: Ĉina Akademio de Sciencoj, fakso +86-10-859-1095.

**Esperanta Jura Asocio (EJA)**

Post longa silento EJA denove aktiv(et)as. Elektiĝis jena nova estraro: prezidanto: K. Enderby, sekretario A. Ruysschaert, kasisto I. Meulendijks. Korespondadreso: s-ro André RUYSSCHAERT, 4 rue



Théodore Eberhard, L-1452 LUXEMBOURG.

**Zamenhof-monumento en Ĉinio**

Tiu projekto estis menciita en LM51. Ĉar pri ĝi alvenis multaj informpetoj kaj kritikema letero de finna E-klubo, UEA sendis jenan komunikon al la Esperanto-gazetaro:

> "La t.n. Zamenhof/Esperanto-objektoj (ZEO) estas grava formo de rekono al la Esperanto-movado, se temas ekz. pri stratoj aŭ placoj, kies nomon decidis urbo aŭ alia publika instanco. Kutime la sola investo, kiun ili postulas, estas tempo kaj iniciatemo por persvadi la decidfarajn aŭtoritatulojn. UEA daŭre instigas al tia agado, kiu jam rezultigis pli ol 1.000 ZEO-jn tra la mondo.
>
> La sinteno de la E-klubo de Jyväskylä al la projekto en Tangshan ŝajnas prava. Estas tre dubinde, ke nia movado uzu sian kapitalon por tiel enorma projekto. La kuraĝo de la Tangshan-aj samideanoj certe estas laŭdinda. Estus tamen pli saĝe unue proponi al la lokaj aŭtoritatuloj, ke ili financu la monumenton por tiel krei turisman allogaĵon. Dum mankas certeco pri publika financado, UEA malkonsilas donaci monon por la projekto.
>
> Singardemo estas ĉiam konsilinda, kiam temas pri monpetoj por celoj, pri kies seriozeco oni ne povas esti certa. Mi petas, ke en ĉiu tia kazo oni sin turnu al UEA, kiu plej bone povas kontroli la aferon. En tre seriozaj kazoj UEA mem povas alvoki por donacoj.
>
> Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA"

**Horaro de Esperantaj disaŭdigoj de Ĉina Radio Internacia**

| UTC | Regionoj | Ondoj (m) | kHz |
|---|---|---|---|
| 20:00-20:30 | Eŭropo | 40,51 40,16 30,11 | 7405, 7470, 9965 |
| 22:30-23:00 | Latin-Ameriko | 43,17 31,65 | 6950, 9480 |
| 11:00-11:30 | Japanio, Koreio | 43,13 31,65 | 6955, 9480 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 13:00-13:30 | Sudorienta Azio | 25,86  25,34 | 11600, 11840 |

**Komercaj petoj kaj proponoj**

**Albanio**

Eksporto de ne-ellaborita kupro. KARAJANI Sh.p.k. (IKEF 176), Rr. "Seid Toptani No 2, Tirana; telefono/fakso 00-355-42-23972.

**Ĉeĥio**

Vojaĝoficejo Tilio (Vladimir k Pavla Dvořák) proponas diversprezajn loĝeblecojn por la praga UK. Petu informilon: Ostravská 637, CZ-199 00 PRAHA 9, telefono/fakso +42-2-899602.

**Ĉinio**

Fuoshan-a Specialŝtala Limigita Kompanio (A, No. 13, str. Sizhilu, CN-528000 FUOSHAN, Prov. Guangdong) produktas nerustiĝan ŝtallaminaĵon diverstipajn laŭ modernaj metodoj. Jara produktokapacito baldaŭ atingos 10 milojn da tunoj.
(laŭ Tutmondaj Scienco kaj Tekniko, 1996/1)

**Côte d'Ivoire**

Familia entrepeno importas (terpomojn, cepojn) kaj eksportas (gingembrojn, priprojn, kolaojn, bananojn) agrikulturajn produktojn; ankaŭ eksportas plastikajn produktojn (ŝuojn, telerojn, glasojn ktp). Inĝ. SEKA Hyacinthe, Ets. Seka & Sons, 03 B.P. 572, ABIDJAN 03, fakso (225)30-36-00.

**Francio**

CL BATIMENT, 90 Rue du Tiefenbach, F-68920 WINTZENHEIM-COLMAR, fakso 89794333, ekde aprilo 1996 bezonas 500 tunojn da cemento (eŭropa kvalito CPJ aŭ CPA) monate. Ankaŭ interesiĝas pri aliaj konstruvaroj.

**Donacoj dum 1995**

La kasisto dankas pro donacoj dum la pasinta jaro ricevitaj de jenaj personoj: anonimaj, Maertens, Pirlot, Sossois, Poupeau, Basso, Parzival, Nakado, Bühl, Gilbert. Ankaŭ dankon pro la diversaj



aldonaj sumoj al la normala kotizpago.

Rimarko por bibliotekistoj kolektantaj la IKEF-revuon

Sian nunan nomon "La Merkato" la IKEF-revuo ricevis ekde la numero 27 (1989). Antaŭe ĝi nomiĝis "Laŭokaza Novaĵletero".

**Novaj membroj**

215. S-ro Frank SPILSBURY, 7 Barrington Road, BEXLEYHEATH DA7 4UN, Britio; tel. 0181-3038849

216. S-ro Manuel J. PINGUINHA, emerita bankoficisto, Póvos, PT-3420 SINDE, Portugalio, telefono (035)91756

217. S-ro Vjekoslav Marankic, Esperanto Societo Rijeka, Korzo 2/A, HR-51000 RIJEKA, Koratio

218. S-ro Zoran ĆIRIĆ, Branka Miljkovicá 14, YU-18000 NIŠ, Jugoslavio

219. S-ro Wu Guojiang, asista inĝeniero/tradukisto/merkat-enketisto, Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo, CN-113008 FUSHUN, LIAONING, Ĉinio, oficeja telefono (0413)2331153, fakso (0413) 2332207

## Komuniko de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Dufoje ni kontaktis plurajn komercajn organizojn al kiuj ni havigis raporteton pri entreprenoj (kaj ties agado) situantaj en diversaj landoj. Nia celo estis transdoni al la hispanoj la plej akuratajn kaj fidindajn informojn pri alilandaj komercaj, industriaj, k.a. firmaoj.

Kompreneble, nia asocio (AEU) nur aktivas por nia internacia lingvo. Tamen, kaj ĝuste pro tio, ĝi iniciatas kaj plenumas ekstermovadajn agadojn, kiel ĉi tiun, favorajn al la rekono kaj aplikado de Esperanto fare de neesperantistoj; ni estas certaj ke de tio dependas grandparte ĝia estonto. Tial ni petegas alilandajn samideanojn, ke ili kolektu la plej interesajn informojn pri la agado de entreprenoj funkciantaj je internacia nivelo en siaj respondaj landoj kaj sendu ilin al ni:

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
(Asociación Andaluza de Esperanto)
Poŝtkesto 864
E-29060 MALAGA, Hispanio

Ni publikigos ilin senpage en nia trimonata revuo "Gazeto Andaluzia" kaj ili ankaŭ senpage estos havigataj al Komerca Ĉambro de Malago (Hispanio), al tiuj de aliaj hispanoj urboj kaj al fakaj gazetoj cele al plej efika diskonigo de la anoncoj.